

- Sub **vagono** – **kuŝvagono**, **litvagono** la komuna klarigo «Pasaĝervagono por dumnoktaj vojaĝoj» estas anstataŭigita per du apartaj klarigoj:
kuŝvagono Pasaĝervagono, ekipita per modestaj kuŝlokoj
litvagono Pasaĝervagono ekipita per litoj
- La nocioj **restoracivagono**, **salonvagono** estas senanstataŭe viŝitaj, ĉar ĉiu scias, pri kio temas.

La redaktoroj de PIV tamen ne akceptis ĉiujn niajn proponojn:

- La termino **magnetvojo** ne estas ripetita laŭalfabete.
- Al la termino **pramo** ne estas aldonita la derivaĵo **pramŝipo**, kvankam la klarigo koncernas grandan ŝipon, ne boaton sur rivero.
- La vorto **subtrajno** ne estas viŝita. La responsa redaktoro *Michel Duc Goninaz* menciis, ke la erariga vorto tamen troviĝas en vortaroj aŭ aliaj publikigoj el naŭ landoj.
- En la klarigo de **vagono** – **vagonaro** la vorto «Unuo» ne estas anstataŭigita per «Kompleto».

RailLexic-korektendolisto

Mi ripetas la informon el TeKu 122, paĝoj 7/8: La enhavaj diferencoj inter la *CD-ROM*-variante de *RailLexic 3.0* kaj la libro-variante „FERVOJA TERMINARO” ampleksas 181 terminkorektojn, 8 diferencojn nur je inversa vorta vicordo laŭ alfabeto listigo, kaj 11 terminojn mankajn en la libroj. Mi povas sendi la korektendoliston al ĉiu interesato.

Karaj geamikoj, mi deziras al la kongresaj partoprenontoj sufiĉe agrablan vojaĝon al Braŝov. Terminarajn kunlaborantojn kiuj ne povas partopreni, mi petas ankaŭ legi ĉi tiun kurieron, kaj eventuale antaŭe rete esprimi opiniojn.

Ĝis la revido en Braŝov

Heinz Hoffmann



Terminara Kuriero

TeKu 124

Aprilo 2005

Komunikilo de Terminara Sekcio en Faka Komisiono de IFEF

Gvidanto de Faka Komisiono:

Jan Uldal Niemann, Hovedvagsstræde 9E, 1 DK-3000 Helsingor

Telefono: +45 49 26 13 19 Retadreso: esperanto@mail.dk

Sekretario de Terminara Sekcio:

D-ro Heinz Hoffmann, Finstere Gasse 2 DE-01445 Radebeul

Telefono: +49 351 8385877 Retadreso: IFEF.B90GR-mei@t-online.de

Karaj geamikoj,

post apero de TeKu 123 pasis kvar monatoj dum kiuj denove alvenis nur malmultaj kontribuoj al la terminaraj taskoj. Mi dankas tiukoncerne al *Zdeněk Polák*, *Alfonz Moró*, *Erik Mortensen*, *Jan Niemann* kaj *Henning Olsen*. Elkore ni bonvenigas du novajn kunlaborantojn en nia sekcio. Dankinde pretas regule terminare kunagi:

- D-ro *Zlatko HINŠT* en Kroatio <zlatko.hinst@hznet.hr>
- *Siegfried KRÜGER* en Germanio <slkrueger@gmx.de>

Du aliaj kunlaborantoj nun havas retkonekton:

- *Darja MANEVA* en Bulgario <darya_maneva@yahoo.com>
- *Erik MORTENSEN* en Danio <erikmo@get2net.dk>

Du geamikoj deklaris ĉesi kunlaboron:

- *Magdaléna FEIFIČOVÁ* en Slovakio pro multaj aliaj Esperanto-aktivecoj
- *Friedrich TSCHOM* en Aŭstrio pro maljunecaj problemoj

Ili akceptu nian dankon pro la pasinta kunago.

La aliajn kunlaborantojn kun retkonekto vi trovas en TeKu 122.

Pri niaj terminaj taskoj

El la kontribua rezulto mi deklaras decidon pri jenaj terminoj:

00873	= biletumado
08719	= fermtempo alvetura (traknivela pasejo)
09450 a	= veturilo etŝpura vagonporta
b	= boĝio etŝpura vagonporta
c	= vagono etŝpura vagonporta
12416	= aranĝado kontraŭ malproksimeco

La nova diskutenda temo sur paĝoj 3/4 de TeKu 123 pri ejoj por influi trajntrafikon, necesigas komplikan trakton en kongresa kunsido, ĉar la koncernaj difinoj kaj terminoj en ĉiuj lingvoj montras ĥaoson. Aperu de nova germana glosaro, kaj ekspliko de *Alfonz Moró* instigis min tute nove pripensi la problemon. Jen du tezoj:

1. La trafikrega kaj trafikdispona centralizado rapide evoluas al ĉiam pli grandaj ampleksoj. Komence „centra” regejo en stacio anstataŭis plurajn stacipartajn regejojn. Sekvis centraj regejoj por tutaj fervojlinioj. Nun jam oni teleregas grandajn partojn de fervojreto.



De "Lia Moŝto", la kunlaboranto dependas nia progreso.

2. En Esperanto eblas samsence vortigi kaj „centra ejo“ (ekzemple centra regejo) kaj „centrejo“ (ekzemple regcentrejo). Ŝajnas oportune, termine diferencigi la gradon de centreco, ekzemple per uzo de „centrejo“, se ampleksas grandajn retpartojn.

Jen pri konkretaj nocioj :

06654

En TeKu 123, paĝo 1, estas menciita la decido „regejo centra kompleksa“. Ĉar laŭ la difino en TeKu 122, paĝo 5, temas pri granda amplekso, la (nur gramatika) modifo de la termino povas esti:

regcentrejo kompleksa

06680


En la difino en TeKu 123, paĝo 3, la verbo „direkti“ ne klarigas, ĉu la ejo enhavas trafiksekurigan teknikon aŭ nur telekomunikan. En nova germana glosaro, la ejo *Betriebsleitstelle* estas difinita kiel centrejo por retparto – kun aŭ sen sekurigtekniko. Ĝi do povas esti aŭ nura *Dispositionszentrale* (disponcentrejo) aŭ *Betriebszentrale* kun trajntrafikestrado kaj disponado (ekzemple nocio 06654). La difino 06680 ebligas identigon kun ĉi tiu supera nocio *Betriebsleitstelle*. Mi proponas la Esperanto-tradukon:

– **trafikcentrejo** –

06686 kaj 06721

Laŭ la difino en TeKu 123, paĝo 3, ambaŭ ejoj enhavas nur telekomunikan teknikon. Sekve ambaŭ terminoj ricevu la saman substantivon. Ĉar la nocio 06686 enhavas la limigan karakterizaĵon „okaze de funkciaj perturboj kaj kapacitperdoj“, ĝia termino ricevu koncernan flankelementon. La nocio 06721 estas pli ĝenerala. Por ĝi sufiĉas substantivo. Sekve jen po pluraj proponoj por elekti:

- o por 06686:
 - 1) **disponcentrejo por perturboj**
 - 2) **reguligcentrejo por perturboj**
 - 3) **disponcentrejo por neregulaĵoj**
- o por 06721:
 - 1) **disponcentrejo**
 - 2) **reguligcentrejo**



Stopmaŝino por balasto

Traktato de Zlatko Hinšt

Nia nova kroata kunlaboranto d-ro Zlatko Hinšt verkis kvinpaĝan traktaton pri signifoj de ekonomiaj terminoj. Enkonduke li rimarkigas, ke speciala problemo de Esperanto estas postrestado en difinoj de terminoj kiuj ekzistas kaj ekestas en moderna ekonomio, inkludante negocado fare de fervojaj entreprenoj. La traktato necesigas detalan studadon. En TeKu 125 mi informos pri taskoj deriveblaj por ni koncerne transportekonomiajn nociojn.

Aperis eldono 2005 de PIV

Jam tri jarojn post apero de „LA NOVA“ PLENA ILUSTRITA VORTARO de ESPERANTO, Sennacieca Asocio Tutmonda (S.A.T.) eldonis trian PIV-on. Ties prezo estas 80 € + sendokosto. Samtempe S.A.T. publikigis en Interreto 29-paĝan korektendoliston por montri la diferencojn inter PIV 2002 kaj PIV 2005. Kiu havas retkonekton, tiu povas havigi la liston al sia komputilo, per TTT-paĝaro de S.A.T.

<http://satesperanto.free.fr/>

sub „Novaĵoj / korektoj de eraroj en la nova PIV – elŝuteblaj en la PDF“.

En PIV 2005 troviĝas ankaŭ korektoj de fervojfakaj nocioj laŭ nia propono rezultanta el decidoj en 55-a IFEF-kongreso (Dresden, 2003) pri forigo de malperfektaĵoj (TeKu 120, paĝoj 2 – 4).

Jen la korektoj en PIV 2005:

- La termino **fervojo** estas ripetita laŭalfabete kun la indiko «Vd vojo» (= Vidu sub „vojo“).
- En la klarigo de **lokomotivo** estas viŝitaj la vortoj «movata de vaporo, de dizelmotoro aŭ de elektro», ĉar tiuj trakciaj fortoj ne estas ĉiuj eblaj – ekzemple mankas gasturbino.
- Sub **metroo** estas viŝita la sinonimindiko «SIN. metropoliteno».
- Sub **metropoliteno** la nura klarigo «Metroo» estas anstataŭigita per «(ark.) = metroo». Tio signifas, ke la vorto estas arkaismo, kaj oni uzu preferinde la esprimon „metroo“.
- Sub **pulmano** estas indikita «(ark.)». La klarigo estas modifita al «Luksa pasaĝervagono».
- En la klarigo de **trajno 2** la vorto «trakveturilunuo» estas anstataŭigita per «trakveturil(ar)o».
- Sub **trajno – subtrajno** la nura klarigo «Metroo» estas anstataŭigita per «(= metroo». Tio signifas, ke oni uzu preferinde la esprimon „metroo“.
- Sub **trako – saktrako** la nura klarigo «Senlira trako» estas anstataŭigita per «Trako, ligita nur unuflanke kun alia trako».
- En la klarigo de **trakcio** la vorto «manovradunuoj» estas anstataŭigita per «manovrokompletoj».

Ekster tiu problemo, ni pridiskutu terminojn pri jenaj nocioj:

00513 Aranĝo de trako laŭ alteco kaj transverseco.

ĉeĥa	plán železničního spodku	itala	appoggio del binario;
dana	sporets beliggenhed; sporleje		piano di posa del b-o;
franca	assiette de la voie		posizione del b-o; sede del b-o
germana	Gleislage	rumana	pat a liniei
hungara	vágányfekvés	serba	podloga koloseka
		Esperanto	traksideo

Ĉar temas nek pri sidi nek pri ejo, jen du proponoj por elekti:

1) trakaranĝo

2) trakpozicio

PIV klarigas:	aranĝi 1	Meti laŭ ĝusta ordo, en taŭgan pozicion.
	aranĝo 1	Maniero, kiel io estas aranĝita, aŭ ties rezulto.
	pozicio 1	Maniero, en kiu objekto aŭ persono okupas spacon.

00587 Povigo fare de regejestro, ebliganta funkciigon de surloka sekuriga instalaĵo, cele al efektivigo de manovraj veturoj.

ĉeĥa	zařízení na povolení posunu	itala	autorizzazione alla manovra
dana	rangeringstilladelse	rumana	permiteerea trierii
franca	autorisation de manoeuvre	serba	dopućenje (manevra)
germana	Rangiererlaubnis		
hungara	totalást engedélyező berendezés	Esperanto	ranĝadpermesilo

Ĉar ne temas pri ilo, jen tri proponoj por elekti:

1) ebligo de surloka funkciigo

2) liberigo de surloka funkciigo - *LIBERIGO POR SURLOKA FUNKCIIGO*

3) permeso de surloka funkciigo

05123 Ŝutaĵo sub trakoj kaj trakforkoj, konsistanta el malmola ŝtonrompaĵo, por plejeble konstante distribui la ekspluatŝarĝon sur la relvojan subkonstruaĵon, por doni al la trako sufiĉan laŭlongan kaj laŭtransversan delokrezistecon, kaj por garantii bonan tralason de aero kaj akvo.

ĉeĥa	kolejové lože; šterkové lože;	itala	letto di ballast; letto di pietrisco;
	kolejové lože z drčeného kameniva		letto di pietrame
dana	sporkasse; ballastlag; skærvelag	rumana	pat de balast
franca	lit de ballast; lit de pierraille	serba	zastorna prizma
germana	Schotterbett; Schotterbettung		
hungara	ágyazat; zúzottkő ágyazat	Esperanto	traksideo balasta

Ni jam decidis por PIV jenan nocion:

balasto 2 Ŝutaĵo (el ŝotro, gruzo, skorio kaj similaj) sub trako, kiu ricevas ŝarĝon de trakveturiloj pere de reloj kaj ŝpaloj, transdonas ĝin al subkonstruaĵo kaj samtempe amortizige kaj flekseble firmigas la trakon.

Pro tio necesas adapti la terminon al PIV. Jen du proponoj por elekti:

1) balasto ŝotra

2) ŝotrobalasto


06087 Sekcio de fervojlinio, sur kiu trajnoj laŭplane estas tracie subtenataj per antaŭa aŭ puŝanta kromlokomotivo.

ĉeĥa	trat' s přípežní a postrkovou službou	itala	tratto con rinforzo
		rumana	parcurs în dublă tracțiune
dana	strækning med forspans- eller skydelokomotiver;	serba	deonica pojačanja vuče (zaprezanje ili potiskivanje)
	forstrækningssersel		
franca	parcours en renfort	Esperanto	veturo kiel kromlokomotivo (antaŭa aŭ puŝanta)
germana	Vorspann- oder Nachschubstrecke; Vorspann- oder Schiebefahrt		
hungara	tolómozdonnyal megtett útvonali; előfogatolt mozdonyal megtett szakasz		

Ĉar ne temas pri veturo, jen du proponoj por elekti:

1) liniosekcio kromlokomotivbezona

2) liniosekcio kromtrakcia



Trajno kun puŝanta kromlokomotivo

09217 Subtera trafikinstalaĵo ĉe kies konstruo unue estas instalataj la flankaj muroj, betonata la kovrila muro, kaj rekonstruataj la superaj veturvojoj, kaj poste sekvas la terfosado kaj konstruado de la subtera veturvojo sub protekto de la kovrila muro.

ĉeĥa	ražení tunelu pod ochranou stropu, zřízeného v předstihu v otevřeném výkopu;	hungara	alagútépítés nyitott árokban
		itala	trincea coperta
		rumana	tunel din șanț acoperit
dana	ražení tunelu berlinskou metodou	serba	izgradnja tunela otvorenim iskopom („berlinska metoda“)
franca	tunnelbygværk i åben udgravning		
franca	tranchée couverte		
germana	Tunnel nach Berliner Bauweise; Tunnelbau in offener Grube	Esperanto	tunelo el kovrita tranĉeo

Laŭ PIV, tunelo estas borita konstruaĵo. Tamen la ĝisnuna Esperanto-termino eventuale estas tolerebla. Alia propono estas: *TUNELO (KONSTRUATA LAŬ BERLINA MODO)*

tuneleca galerio

PIV klarigas: galerio-4

Subtera koridoro, trairejo: